


# Esperanto

## EN SKOTLANDO

OFICIALA BULTENO DE LA  
SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA



Cion por la Redaktoro sendu al:  
**TOM FRASER,**  
2 Lady Helen Street,  
Kirkcaldy



Abonojn sendu al la Kasisto:  
F-ino **ANNE EYRE,**  
17 Kelvin Gardens, Hillhouse,  
Hamilton, Lanarkshire.

## ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 64

Aŭtuno 1966

Jarabono, 3 ĝil. (6 Steloj)

Finiĝis la eksterdoma sezono; komenciĝas la sezono por endomaj aktivoj - la sezono por Esperantokursoj. Multaj kaj diversaj estas la manieroj laŭ kiuj ni povas subteni kaj antaŭenigi la Aferon. Ĉu nur esti esperantisto sufiĉas? Jes! se ni komprenas "esti" kiel la aktivan partoprenadon en esperantistaj aktivoj. Ĉiu havas sian propran talenton kaj kapablon, kaj por ĝui la vivon ĝis maksimumo ĉiu devas utiligi siajn talentojn, ekzerci siajn kapablojn: ĉiu povas aniĝi al almenaŭ unu esperanta organizaĵo, aboni almenaŭ unu esperantan gazeton, aĉeti libron de tempo al tempo, aŭskulti al esperantaj radioprogramoj kaj skribi dankleterojn al la rilataj stacioj; sentrude atantigi aliajn pri la ekzisto, utilo kaj celoj de la Movado. Instruistoj povas provi interesigi ĝelernantojn pri nia lingvo kaj stimuli ilin partopreni la interŝanĝon de artikoloj kaj desegnoj kun infanoj de alilandaj lernejoj sub la aŭspicio de "Grajnoj en Vento" (por detaloj, skribu al "Grajnoj en Vento", Marcel Erbeta, rue des Pins 66, 2500 Bienne - Biel 7, Svislando; enmetante Stelon aŭ respondkuponon por la respondo). Skribemuloj povas partopreni la polemikofakon de B.E.A. nun organizatan de S-ino M.A. Collins, 43 Sussex Place, Slough, Bucks., per kio ĉiu mencio de Esperanto aŭ rilata temo povas ricevi eĥon, tiel almenaŭ duobligante la pri-esperantan propagandon en Britujo; tiuj kiuj loĝas en urboj kie funkcias grupoj povas subteni la grupprogramon, eĉ se nur per ofta ĉeesto de la kunvenoj; ĉiu povas korespondi kun eksterlandano(j). Eble la plej grava tasko el ĉiuj estas la kreo de novaj esperantistoj. Se vi ne povas varbi aŭ instrui, vi povas almenaŭ ĉeesti la unuan vesperon de kurso por lanĉi ĝin entuziasmige sur la malfacilan lernomaron. Se vi estas kompetenta aŭ kompetentigema, sed loĝas en loko kie ne okazas kurso, vi povas proponi vin kiel instruiston en la perpoŝtaj kursoj de B.E.A. Ĉiu povas uzi esperantan leterpaperon tiel silente farante utilan propagandon; povas aĉeti kaj uzi esperantajn kraĵonojn kaj plumojn ĉiam kaj ĉie; povas ĉiam porti nian stel-insignon; unuvorte estu esperantisto!

\* \* \* \* \*

De la Skota Federacio, almenaŭ 14 anoj partoprenis la 39an S.A.T. Kongreson ĉe Swanwick, Derbyshire, okazintan inter la 23a kaj 30a de Julio. Ĝi estis, laŭ partoprenintonombro, dekone malpli granda ol la U.K. ĉe Budapeŝto sed regis vere internacia atmosfero de amikeco. La fakto ke ĉiu loĝis en la sama domaro helpis krei familian etoson kiu pliigis la senton, ke oni estas vere en Esperantujo. La programo estis ĝuinda, stimula, kleriga kaj varia, kaj la manĝado superabunda kaj luksa. Bonege laboris la malgranda aro da organizantoj kaj ilin helpis ankaŭ anoj de la neŭtrala movado. Aŭdigis pli ol unu fojon dum la semajno, desiro ke S.A.T. kaj U.E.A. pli intime kunlaboru kiam tio eblos kaj necesos. La kongreso por 1967 fariĝos en Malmo, Svedujo, kie lokuloj jam komencis la preparlaboron. La dato estas 29a de Julio ĝis 5a de Aŭgusto.

GRANDAJ SKOTOJPASTRO HENRY DUNCAN, D.D.

Granda estas tiu kiu ion faras unuafoje (Adam Smith).

Se grandeco konsistas nur en okulfrapaj faroj kiuj imponas al ordinaraĵoj pro siaj malofteco, danĝero, malfacileco kaj romantikeco, nia nun-traktata grandegulo ŝajnus pigneo: sed se grandeco konsistas en la efiko sur la mondon de iu homo, de la influo kiun li havis sur aliaj, de la sekvoj de tiu influo kaj de la daŭro de tiu influo, Henry Duncan rajtas al loko inter grandaj skotoj.

Li naskiĝis la 8an de Oktobro 1774 en la gubernio Kirkcudbright kaj lia pastra patro destinis lin komercisto, sed Henriko estis tro homama por komerca kariero. Li forlasis komercajn studojn kaj iris al Edinburgo al la pastra kolegio. Dum studado tie li renkontiĝadis kun la intelektularo, kio helpis plivastigi liajn horizontojn. Li pastrigis en 1798 kaj estis akceptita por la paroĥo RUTHWELL en suda Skotlando kie li restadis la tutan vivon. Tio ne signifis, ke li vegetis tie. Kontraŭe, li rigardis la tutan mondon de sia loko kaj aŭdigis sian voĉon tiel pri internaciaj kiel pri regionaj demandoj. Se li vivus hodiaŭ li nepre ne paciencus pri fak-monopolo-disputoj ĉar li pretis mem fari ĉion ajn se li nur opiniis ĝin farenda, senatente ĉu estas afero pri kio oni atendus, ke pastro sin okupu pri ĝi. Ekzemple, kiam serio de magraj rikoltoj en la distrikto minacigis malsaton li persone importis grenon de Liverpulo kaj sisteme porciumis ĝin al bezonantoj, nek donace, nek profite, kvankam pro tio, ke li vendis ĝin aĉetpreze, li perdis monon. Li kredis, ke la plej efika maniero helpi homojn estas helpi ilin helpi sin mem (la F.A.O. de U.N. retrovis niampe la saman veron. Vanas nur sendadi donace manĝaĵojn al malsatantaj landoj. Oni devas sendi laborilojn kaj cedi al naskiĝantaj industrioj la eblon vendi siajn produktaĵojn en la mondmerkato). Li do enkondukis lin-ŝpinadon kiel domindustrion; li dungis virojn por prilabori la pastran bieneton tiel atingante plibonigitan bienon kaj plibonigitajn paroĥanojn samtempe. Tiaj faroj montras, ke liaj komercaj studoj ne estis perditaj; li emis figardi materialajn problemojn de pragmatika, praktika vidpunkto.

Kiam Napoleono minacis invadi, Henriko organizis volontulojn kaj mem servis kiel kapitano. Li verkadis pamfletojn pri diversaj temoj; li kontribuis al sciencaj akademioj; li elfosis kaj renovigis antikvan krucon keltan pri kiu okazis multege da fakecaj diskutoj; li observis fosiliojn, spuron de kvarpiedulo, laŭ li, postlasitan en la rokoj apud Lochmaben, kaj ensendis disertaciojn pri ĝi al la geologia societo; li verkis serion de artikoloj nomitaj "The Cottage Fireside" (la Dometa Kameno) en kiuj li filozofiis eduke al la legantoj; li verkis tutajn librojn inter kiuj la kvarvoluma "La Sankta Filozofio de la Sezonoj", speco de enciklopedio de populara scienco, tuŝanta astronomion, botanikon, geologion ktp. estis tiel ŝatata, ke kelkaj eldonoj necesis. Sed, nekontenta pri la nombro da homoj kiujn li povis atingi per predikado kaj okaza verkado, li fondis ĵurnalon, "Dumfries Courier" kiun li mem redaktis. Tie li ne limigis sin al distriktaĵoj sed pri-traktis internaciajn problemojn; ekzemple la emancipigon de la sklavoj en Ameriko - kaj lia ĵurnalo havis legantojn ankaŭ tie! Al lia domo venadis vizite multaj elstaraj homoj kiaj la reformisto Robert Owen, la poetoj Burns kaj Hogg; li energie korespondis ekzemple pri la aktuala temo "libera komerco" kaj la emancipigo de Romkatolikoj kion

li fervore subtenis ĉar li, neŝanceligebla Protestanto, volis, ke aliaj havu la saman liberon praktiki siajn religiajn kredojn.

Sed antaŭ ĉio, lia famo kaj merito baziĝas sur la fakto, ke li, la unua en la mondo fondis ŝparbankon. Li, kiel ni jam diris, malŝatis nuran donac-bonfaron. "Bono per sprono!" povis esti lia devizo. Eble li ne konsciis, ke la rezulto de ŝparetado de multaj neriĉaj homoj povus forte apogi la evoluon de grandaj entreprenoj kiuj forte antaŭenpuŝis la teknikon kiu siavice ŝanĝis la vivon de la tuta mondo. Tre verŝajne li pruntis la deponitan monon al ordinara banko, alie li ne povis esti doninta tiel altan interezon de 5%, do eble nur por krei fidon ĉe deponemuloj, li farigis grandan lignan keston kun tri seruroj tiel ke oni povis malfermi ĝin nur en la ĉeesto de tri oficuloj. La unuan jaron, pere de multa propaganda laboro, li enkasigis £151. Post tri jaroj la jarinvesto atingis £922. La regularo de la ŝparbanko estis iom strikta - la deponantoj sugeris monpunon unu ŝilingan, se ili ne deponis almenaŭ kvar ŝilingojn dum la jaro! Se ili ne ĉeestis la jarkunvenon ili same suferis monpunon.

Lia ŝparbank-ideo famiĝis kaj li kondukis vastan korespondadon pri ĝi, respondante al ĉiu letero kaj pagante la koston el la propra poŝto. Li ricevis nenian materialan rekompencan - tion li ne celis. Li verkis traktaton pri sia ŝparbanko kaj devis reeldoni ĝin plurfoje, tiom granda estis la intereso. Ekaperis similaj ŝparbankoj, unue en Skotlando, poste en Anglujo: en Liverpoolo, 1815; Manĉestro, 1818. Ĝis 1844, funkciis 577 ŝparbankoj en Britujo kun deponaĵoj sumantaj £30,000,000. Kiel ĉio nova, la ideo renkontis ankaŭ kontraŭstaron. Iuj suspektis, ke ĝi estas ruzaĵo per kiu la malriĉuloj pagas la ŝuldojn de la registaro al riĉuloj, do kiam oni proponis fari leĝon por kontroli kaj protekti la funkciadon de ŝparbankoj ekleviĝis voĉoj kontraŭ la leĝpropono. Aŭdinte pri tio, Henriko Duncan selis sian ĉevalon kaj rajdis al Londono, 700 k-metrojn for, por defendi siajn ideojn. La leĝo estis farita kaj Henriko estis honorita kaj invitita al la grandsalonoj de la ĉefurbo; sed li baldaŭ reiris al sia loketo; la leĝo estis farita kaj la vojo por la disvastiĝo de ŝparbankoj estis malfermita. En 1861 la elstara politikisto Gladstone kreis la post-ŝparbankon, la plej praktika maniero laŭdi la ŝparbank-movadon.

Henriko Duncan estis homo de altaj principoj kaj lia ŝparbanko estis nur unu faceto de lia aktiveco. Estiĝis la granda disputo en la skota eklezio pri tio, ĉu la registaro subvenciu kaj do iom kontrolu la eklezion. Henriko estis unu el la kelkcent pastroj kiuj en 1843 rezignis siajn postenojn proteste kontraŭ la intermiksiĝo de la registaro. Ili fondis "La Libera Eklezio de Skotlando". Tio signifis veran oferon. Li devis forlasi la pastran domon, lia hejmo dum 44 jaroj, kiu multe pliboniĝis pere de lia laborado kaj fidi al la subteno de tiuj paroĥanoj kiuj same sentis pri la registara partopreno en religio. Li mortis dum li kondukis diservon en la domo de unu el siaj lojalaj preĝejanoj, laŭdire pro trolaboro, je la 10a de Februaro, 1846.

Se iam ekzistis "tipa skoto" - ŝparema, bone edukita, memstara, defend-kaj argumento-preta - tiu estis Henriko Duncan, fondinto de ŝparbankoj.

R E C E N Z O .

VERSOJ ELEKTITAJ de Sergej Jesenin, diversaj tradukintoj. Kompilis kaj redaktis K. Gusev kaj I. Ĥoves, ilustris V. Cvetkova. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo 1965. 64p. 20 x 13,5 cm.

Jesenin (1895 - 1925) estis lirika poeto, bardo ĉefe de la kamparo, apenaŭ tuŝita de la revolucio. Li trovas sian verkimpulson en la ĉirkaŭanta lin naturo, aŭ en la torento de la propra emociaro, en amo kaj en belo pli ol en sociaj problemoj. Lia spirita patro estis, verŝajne, Puŝkin. Lia tono, precipe en la fruaj verkoj, estas arda:

Sutas paduso neĝerojn,  
Ploras la rosaj brilegoj.  
Kapojn klinante al ĝerموj  
Paŝas en sulk' frugilegoj.

Herboj susuras silkverdaj,  
Vent' pinaromon alportas.  
Aŭdu vi, kampoj kaj kverkoj,  
Min primavero narkotas ...

Estas agrable, havi tiel ampleksan kolekton de la verkoj en Esperanto, kaj la tradukintoj (Gusev, Rublov, Ĥoves kaj Drezen) faris ĝenerale bonegan laboron. Oni salutas entuziasme la sovetajn poetojn-samideanojn, kiuj per sia verkado aldonas kaj aldonos gravan eron al nia nuna kulturo. Kelkaj tipaj rusaj ritmoj, kiuj sporade aperis en Esperanto sed bedaŭrinde ne sufiĉe hejmiĝis en nia poezio, ricevas en tiu ĉi kolekto fortan esperantan impulson, kiu antaŭvideble ne restos sen-eha ankaŭ en nia originala verkaro, ekzemple:

Ne kuracas vastaĵo blua.  
Kantoj, eble ne ĵeti vin for?  
Vojon glatan vesper' senbrua  
Supersutas per luna or'.

Kaj eksonas ĝoje-majeste  
Jena krio tra l'venta sun':  
- Ho, vivanto, malvarma estu,  
Kiel or' de tili' en aŭtun'.

Al mi persone, la voĉo de Jesenin sonas emociige, kaj lirikamantoj bonvenigos ĉi kolekton. Al la ĝenerala leganto ĝi prezentas neniun baron, ĉu lingvan ĉu enhavan; ĝi meritas esti legata.

WILLIAM AULD

Librokolektanto volas ricevi de ni kompletan kolekton de "Esperanto en Skotlando". Mankas al ni por plenumi lian peton, numeroj 1-24; 47-49; 53; 56-57; 59-60. Se iu(j) pretas liveri iu(j)n el tiuj numeroj, bonvole unue skribu al ni indikante la proponatajn numerojn. Antaŭdankon.

"ANGOROJ"

Mi mem sentas angoron pri "Angoroj". Ankoraŭfoje oni renkontas la problemon, ĉu recenzi sincere - aŭ esperantiste-sincere. Kiam bravaj samideanoj investis tiom da talento, tempo kaj mono, ĉu decas deklari rekte, ke ilia investo malprosperis, pro unu apriore alprenita erarega principo, sur kiun ili malprudente starigis sian entreprenon? Mi opinias, ke jes. Mi opinias, ke ilia eraro estas tiel fundamenta, ke oni ne rajtas prisilenti ĝin.

Tre arde mi esperas, ke oni neniam montros tiun ĉi filmon al publiko neesperantista, ĉar tia montrado nur konfirmos al la publiko ĝian antaŭjuĝon, ke Esperanto estas ia kodo nenatura, kiun ĝiaj adeptoj nur balbute kaj pene sukcesas paroli. Por ke la filmo estu tuj pli-malpli komprenebla al submezaj esperantistoj, le-entreprenintoj decidis, ke la aktoroj pa-ro-lu-ti-re-kaj-mal-rap-id-eg-e; kaj tio estis decido, kiu detruis la filmon, tutsimple.

Ĉar nenatura parolado nepre kondukas ĝis nenatura aktorado, ĝis ridinde malkonvinka agado. Eĉ al esperantistoj "Angoroj" impresas amatorece; neesperantista publiko nur mokus ĝin. Kaj tamen! Mi estas arda admiranto de Internacia Arta Teatro, kaj mi jam vidis kiel profesie-konvinke, eĉ ekzalte, ili scias roli - kia belega sperto estis "La Respektama Putino" en Harrogate, ekzemple! Sed la kondiĉoj de tiu ĉi filmo tute malebligis al tiuj bonaj geaktoroj realigi sian potencialon. Unu el la fortaj flankoj de la filmo troviĝas en la teksto, kie la krimuloj interparolas per lerta speco de krimula "slango"; sed tiuj paroloj viglaj, kiuj devus jetiĝi kaj rejetiĝi de unu persono al alia laŭ natura maniero de efektivaj slange-parolantoj, estas tiel tirataj, kun paŭzoj nenaturaj inter ĉiuj replikoj, kaj kun gestoj kaj vizageprimoj kiuj ŝajnas groteskaj pro la lanta progreso de la konversacioj, ke ili perdas tute sian trafecon kaj sian ekzist-pravigon.

Aldonu al tio, ke, malgraŭ la malrapidaj paroloj, la sinkronizo de la voĉoj kun la pli frue faritaj buŝmoviĝoj estas ĝenerale tre malpreciza (kompreneble, ankaŭ al tio la malrapidaj paroloj kontribuas!), ke rezultiga filmo vere fuŝa.

Ĉu tute? Nu, ne: la filmado estas tre lerta, kaj la reĝisorado ankaŭ. Tiurilate oni povas konstati, kiom da vera talento estis ĉerpebla por la entrepreno. Krome la temo, eĉ se leĝera, kapablis doni leĝeran plezuron - - sed ankaŭ tiurilate permesu unu ĉikaneton: mi ne komprenas kiamaniere la kadavro de Henriko, mortpafita kiam li malfermis la keston, sukcesis sin fortiri de tiu kesto kaj sin kaŝi en angulo por esti nerimarkata poste de Karleto kaj Irena? Nu, se la cetero estus konvinka, mi verŝajne ne estus rimarkinta tian detaleton . . .

Ĉu komplete malŝparo de mono? Mi opinias, ke ne - se la I.A.T., rehavinte sian kapitalon, kuragoŝ fari novan filmon, ĉi foje fidante al la lingvo, kiun ili tiel perfekte mem posedas, kaj al la potenco de sia talento, kiu kapablas kuntiri kun la aktoroj ankaŭ tiujn esperantistojn, kiuj "tro malrapide aŭskultas."

WILLIAM AULD.

LA TRAGEDIO DE L'HOMO de Imre Madach, elhungarigis K. Kalosay; eldonis Corvina, Budapeŝto: drama poemo en dek kvin bildoj; 259 paĝoj; prezo 16ŝ Sp. (33,4 Steloj); de B.E.A. kaj aliloke. afrankite

Ĉi tiu estas ĉefverko de la hungara literaturo. Ĝi temas pri la kialo, signifo kaj celo de la vivo, memorigante pri "Paradise Lost" (Milton); "Back to Methusaleh" (Shaw); "Faŭst" (Goethe); "Peer Gynt" (Ibsen) kaj "Cain" (Byron). Ĝi estas tre populara en Hungarujo, kie en nura Budapeŝto oni jam prezentis ĝin pli ol milfoje. Tio estas facile komprenebla ĉar kvankam la teksto estas ofte malfacila filozofiado, la scenoj estas imponaj, kolorplenaj spektakloj donantaj vastan kampon por reĝisoro kaj kostumisto. Legante ĝin ni spertas tiun ekscito-vibradon kiu nepre pravas, ke parolas al ni geniulo. Ĝi havas avantaĝon super "Paradise Lost" per sia plia moderneco kaj same malavantaĝon kontraŭ "Back to Methusaleh" per sia plia aĝo (ĝi verkigis en 1859-1860). La efiko de la Milton-aj strofoj kie li imponeme parolas pri la ŝiro el la tersino de substancoj per kiuj fabriki armil-egojn (kanonoj) por la kontraŭ-Dia rebelo, iom ridetigas nin ĉar ni jam familiarigis kun nukleo-forto. Simile la sceno kun sciencistoj de la Madach-estonteco malimponas al ni, kutimintaj al moderna sintezkemio: kaj la terspirita brido al Adamo, kiam ĉi tiu volas flugi for de la lin ĝenanta ter-medio, ne povas impresi nin kiel Madach intencis; nin, kiuj legas pri la atingataĵoj kaj atingotaĵoj de spacesplorado.

Sed tiuj estas bagateloj. Ĉe prezentado de la dramo ni forgesus ilin ĉar ĝi ja traktas pri eternaj problemoj fontantaj el la homeco mem. Se Shaw difinis la celon de la homaro, ĝia liberigo de materio; ĝia transformigo en spiralaĵoj de energio, eble la celo, laŭ Madach, estas la konstato, ke ne ekzistas fincelo :-

" - - la vivo estas lukto

Ĉi lukto mem estas la cel' de l'homo."

Konservativaj esperantistoj bedaŭrus, ke Kalocsay elektis ankoraŭ 'novajn' neologismojn kiujn li certe povus eviti per uzo de rutinaj vortoj (tamen ĝuste rutinaj vortoj naŭzas la literaturistojn!): Ekzemple, ĉipa (malkara); disdegni (malŝati); pita (eta kaj aĉa); ebo (malfluso) ktp., sed La Tragedio estas direktata al instruituloj kiuj ne domagas la koston de bela vesto por grandioza kreaĵo.

Gradgring (la Dickens-a) p. 11 kaj 253 devus esti Gradgrind. Kial uzi la formon Athensa ne Atena? La unua staras kiel ŝtono en la gorgo kaj apogas la lasta-tempan aĉan modon kiu postulas la barbaran Edinburgho anstataŭ la rafinitan Edinburgo: sed - denove bagateloj. Ni iam ĝuu la intelektan feston spekti prezentadon de ĉi tiu verkapogeajo en ĝia esperanta vestaĵo!

\* \* \* \* \*

BOHUSLAN - feria regiono en Svedujo. Per persista laboro de 5-ano Einar Dahl (la konata esperanta senatano en la sveda parlamento) oni eldonis en Esperanto belan, multkoloran prospekton pri la marbordo norde de Gotenburgo. Ni petas VIN skribi al GÖTEBORGS OCH BOHUS LANS TURISTTRAFIKFORBUND, Drottningtorget, Goteborg, Svedujo, petante senpaga(j)n ekzemplero(j)n de la faldprospekto. Tio pruvos la taŭgecon de Esperanto kiel reklamlingvo kaj havigos al vi multan informon pri ĉi tiu vizitinda regiono. La prospekto formas tre taŭgan legaĵon por Esperanto-klasoj.



"JEN AŬSTRALIO"

Tiuj, kiuj partoprenis la 6an Skotan Kongreson de Esperanto tiel multe ĝuis la filmon "Jen Aŭstralio", ke oni projekciis ĝin duan fojon. La belegaj koloroj, kaj la klara komentario en Esperanto, tre plaĉis al ĉiuj. Sajnas, ke pro la progresoj de la scienco la mondo ŝanĝiĝas, sed je la komenco la filmo prezentis al ni la saman pejzaĝon kiun la unuaj koloniistoj vidis antaŭ longe. Ni esperu, ke la allogaj bird- kaj besto-specoj propraj al Aŭstralio neniam formortos!

La ĉefaj urboj troviĝas ĉe la marbordo, kaj ili estas modernaj kaj dense loĝataj, sed la interno restas preskaŭ neloĝata, precipe pro manko de akvo. La "bona" vetero daŭras longe, eble tro longe, kaj nuboj da polvo leviĝas kiam ajn bestaro aŭ veturilo moviĝas. Kia kontrasto al Skotlando kie pluvmanco ne estas problemo! La "veraj" aŭstralianoj estas la kamparanoj. Grandegaj aroj da bestoj devas esti prizorgataj. La nuntempa transportado de bovoj kaj ŝafoj per aeroplanoj certigas, ke ili ne suferas pro longa veturo. La viando, kiun oni ankaŭ sendas tiamaniere, restas freŝa. Aŭstralio estas lando kun propra industrio, kiu bezonas multajn laboristojn, kaj enmigrantoj el diversaj landoj tiel sin okupas. Unue, tamen, mia opinio, malhelpoj ne povas ne rezulti el la lingva diverseco.

Kvankam la aŭstralianoj multe laboras, ili ankaŭ scias bone distri sin per velado, naĝado, fiŝkaptado, kaj ondoglisado. Ĉevalkurado eble estas pli disvastigita ol en iu alia lando. La estonteco dependas de la novaj pioniroj kiuj iras piede al la neloĝataj regionoj por trovi la sekretojn de la tero. Ili sendube sukcesos, kaj donos pli da prospero al la lando. Estas facile kompreni kial tiom da homoj iras al Aŭstralio. La filmo estas bonega, belega, informa kaj tre ĝuinda, sed, bedaŭrinde, tro mallonga. Kia bona propagandilo tiel por Aŭstralio kiel por Esperanto!

M. BLACK.

SOVETA UZBEKISTANO estas broŝuro, 14,5 cm. x 21,5 cm., 27 paĝoj. Eldonita de Esperanto-Komisiono de Uzbeka Amikeca Asocio. (Tradukinto - P. Poliščuk.)

Jen amaso da faktoj rilate al la Uzbeka Soveta Socialisma Respubliko (aŭtonoma ŝtato de USSR.) Oni traktas komence lom de la geografio. Tiu ĝi ero mem estas sufiĉe interesa kaj oni profitus havi mapon apude. La teritorio estas 450 miloj da kvadrataj kilometroj kaj tio superas la teritorion de Anglujo, Belgujo, Nederlando, Svislando kaj Aŭstrujo kune! Sed 60%, ĉefe en la okcidento, estas arda sablaro de la dezertoj, kaj 20% en la oriento estas montoj - fakte nur dekono de la lando estas utila por ter-kultivado.

Aliflanke ĝi havas kolosajn provizojn da energio en la grandaj rapidfluantaj riveroj. La uzbeka popolo devenis de antikva turklingva raso, kaj nur nombras 10 milionojn. Nuntempe la industrio de Uzbekistano atingis la nivelon de la plej evoluintaj landoj kaj la produktiveco nun estis dekoble pli alta ol antaŭ la revolucio.

La broŝuro estas bone presita kaj la materialo estas interese prezentita. La lingva stilo estas klara kaj facile legebla. Ĉi tiu libreto certe plaĉos al tiuj kiuj ŝatas legi pri aliaj landoj.

W.A.M.



AMUZO MALGRAŬ PLUVO

Pluvis - pluvegis - la tutan tagon, la tagon de la pikniko organizita de Kirkcaldy-Esperanta Grupo je la dektria de Aŭgusto, mil naŭcent sesdek ses. Estis jam aranĝita kane kunveni sub la arbo - sufiĉe granda arbo - je la enirejo de Beveridge-Parko. La edzo kaj mi unue alvenis frue kaj atendis, atendis, atendis. Jen ni sidis kaj rigardadis eksteren el nia eta aŭto, al la pluvo kiu falis kaj resaltis de la grundo. Fine venis tra la diluvo iu kiu portis longan, malmodan - do utilan - pluvmantelon. Jen - F-ino Sinclair. Hura! ja estas almenaŭ la ĝusta dato!

Baldaŭ aliaj alvenis kaj ĉiuj aliĝis al ni en la aŭton ĝis, sufoke, ni sentis kiel sardinoj en skatolo, aŭ vortoj en Plena Vortaro - ĉiu povanta plivastigi por okupi dekoble pli da spaco. Sed alia esperantista aŭto alvenis kaj ĉio ordiĝis. La pluvado tute ne ĝenis nin ĉar ni bone sciis, ke S-ino Fraser, la sekretario de la grupo, certe faris aranĝon por ni ie, kaj kompreneble, ja okazis. Ni trovis nin en komforta preĝeja halo kun hejtiloj, sufiĉe da seĝoj kaj temangejo.

Inter nin venis gastoj el Jugoslavio, ges-roj Zupaniĉ, kiuj feris en nia lando por vidi sian antaŭnelonge naskitan nepon, Kevin, filo de gesamideanoj Jack kaj Mia Casey. Mi scivolas en kiu lingvo la infaneto unue parolos? Ĉar ŝajnis al mi, ke Mia parolas nur Esperante (ŝi nepre babilas al sia bebo ankaŭ en la gepatra lingvo). Mi neniam antaŭe aŭdis esperantiston paroli tiel rapide kiel S-ro Zupaniĉ. Ni aŭskultis al li kun zorga koncentriĝo (aparte la "malrapidaj aŭskultantoj" kiel mi). La horoj forflugis treege rapide kun kantoj, ludoj, ktp., kaj ni disigiĝis ĉirkaŭ la oka sentante ke, malgraŭ la vetero, la pikniko estis granda sukceso.

Mi poste aŭdis melankolian historion pri netrafinta samideanino. Ŝin renkontis survoje iu babilema amikino kiu, sub ŝirmo de granda ombrelo, babiladis tiel diluve kaj senĉese kiel la pluvo. La samideanino estis tro malkora por finigi la inter(?)parolon do kiam ŝi fine liberiĝis ŝi alvenis post foriro de ĉiuj krom unu kiu atendis ĝuste por gvidi tiajn malfruintojn al la halo. Ve! la sinjorino estis treege diskrete edukita kaj ŝajnas, ke unu el la aferoj kiun oni tutsukcesis instrui al ŝi estis "neniam aliru sub arbon al unu sola viro". Do la viro daŭris atendi sub la arbo kaj la timema sinjorino rigardis lin de diskreta distanco ĝis fine aŭto revenis de la halo kaj forportis la atendantan viron je 70 minutoj post la rendevua horo. Se nia komuna avino Eva estintus tiel same timema kaj diskreta pri meze lokita arbo kaj sola viro tie, kiom da aferoj ne estus okazintaj! Eblas tro rafini edukadon, ĉu ne?

BETTY GOODFELLOW.

NIA AFERO ANTAŬ LA PUBLIKO. En ĉiusemajna rubriko de Fife Free Press, kie oni per kolono da teksto kaj foto prezentas iun lokan notindulon, oni komencis je sabato la 27a de Aŭgusto per - "Ĉi semajne ni parolas pri Esperanto - or for those who don't speak the language - I am going to tell you something about Esperanto . . ." La artikolo prezentis nian viglan koleginon, S-inon Fraser de Kirkcaldy, kaj duono de la tuto temis nur pri nia lingvo - ne malbona reklamo! - kaj meritita honoro por laborema samideanino.

Merkredon, 18an de Aŭgusto, okazis tre interesa kaj ĝuinda kunveno ĉe la GLASGOVA FERVOJISTA KLUBO, kiam gastis S-ro Zupaniĉ el Zagreb, Jugoslavio, kiu feris ĉe ges-roj Casey. Patro de Mia (edzino de S-ro Casey, Prezidanto de la Fervoĵista Klubo), S-ro Zupaniĉ estas fervoĵisto, kiu esperantiĝis en la jaro 1925, kaj sekve flue kaj sperte regas la Esperanto-paroladon.

S-ro Zupaniĉ diris, ke Skotlando tre allogas lin. Li jam faris viziton al, inter aliaj lokoj, Loch Katrine, Stirling kaj la Wallace-monumento kaj trovis la pejzaĝon belega. Tio kio plej impresis lin estas la verdeco de la montoj eĉ ĝis la pintoj, sendube kaŭzita de la abundo de pluvo. En Jugoslavio la montoj estas pli altaj kaj ne verdaj sed tre rokaj. Li trovas la skotan veteron "ne malbona", sed, kompreneble, ne tiel varma kiel en la hejmlando.

Oni faris al nia jugoslava gasto multajn diverstemajn demandojn. Ekz; S-ro Petro Harvey priskribis la fervojan sistemon en la Glasgova regiono kaj demandis pri la jugoslava. Ambaŭ flankoj estis plene priskribitaj kaj diskutitaj. S-ro Hamilton deziris informiĝi ĉu S-ro Zupaniĉ opinias, ke estas necese, ke policanoj portu revolveron. S-ro Zupaniĉ respondis, ke efektive ĉi tiun temon li neniam antaŭe pripensis ĉar kompreneble en Jugoslavio la policanoj ĉiam portas revolveron. Tamen, nur nun pripensante ĝin, li opinias, ke estas pli bone ke ili portu revolveron. Alia demando rilatis al la trafiko kaj en Glasgovo kaj en Zagreb. La respondo estis, ke la trafiko en Glasgovo estas multe pli densa kaj rapida ol en Zagreb, kie ne estas unu-voĵaj stratoj.

La horoj fulmrapide pasis, kaj post taso da teo kaj biskvito mi bedaŭrinde devis forlasi ĉi tiun tre amikan rondon por trafi vagonaron hejmen, sed mi estas certa, ke la babilado daŭris multe pli longe.

S-ro Casey sonbendigis la plej grandan parton de la interparolado.

ANNE EYRE

\* \* \* \* \*

3 Dafforne Road, London. S.W.17  
2an de Julio, 1966.

Al la Redaktoro:

Estimata Sinjoro,

Ankoraŭ pri THE CULTURAL VALUE OF ESPERANTO  
de D.B. Gregor.

Eble indas menci, ke la distingo inter 'natura' kaj 'artefarita' venas el la romantika filozofio de Rousseau, kiam la homoj kredis, ke estas io aparte inda en la produktaĵoj de la Naturo, kio iel ne troviĝas en artaĵoj. Tiu filozofio estas nun komplete eksmodiĝinta.

Estas bedaŭrinde, ke artikolo intencita por moderna legantaro devis komenci per apelacio al tiu delonge mortinta argumento.

Cetere mi miris, ke la artikolo de Gregor diris multon pri la kultura valoro de la lingvo sen citi ekzemplojn pri la simpleco kaj sistemeco de la gramatiko kaj derivado. Eble simpleco estas tabuaĵo inter edukistoj!

A.D. FOOTE

M I M E M

Mi devas vivi kun mi, do tial,  
 Mi volas al mi, esti inda ĉiel.  
 Mi volas rajti dum tempoforpasso,  
 Rigardi al mi sen kulpembaraso,  
 Mi ne volas ke mi, je l'fino de tago,  
 Malamu min mem pro ne-inda ago.

Mi ne volas gardi en sinomalhelo,  
 Sekretojn kaj kaŝojn kun ĉia malbelo.  
 Kaj trompi min dum la vivaferoj,  
 Ĝis kredo, ke pri mi kaj miaj malveroj  
 Neniu suspektos per eĉ unu grajno:  
 Mi ne volas min vesti per nura versaĵo.

Mi volas eliri kun kap' alttenita,  
 Je ĉies respektó mi estu merita,  
 Kaj malgraŭ ĉi-monda mamona konkuro,  
 Mi rajtu min ŝati en plena mezuro:  
 Sed Ho! kvankam oni divenus nenion,  
Mi konas la suban blageman mion.

Min kaŝi de mi, neniam mi povas.  
 Plenlume mi vidas, kion aliaj ne trovas;  
 Ne scias aliaj kion scias mi sole;  
 Neeblas sintrompo; do ĵuras mi vole,  
 Ke spite mem-aĉon aŭ ĝenfivaferon,  
 Mi indu, de l'propraj riproĉoj, liberon.

Anonime  
 (el la angla)

